



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 1

Januaro, 2016

*Kara Leganto, “hazarde” por ni ĉiuj komenciĝis la Nova 2016 jaro. Fakte, ne tiom da hazarde, ĉar ni, Esperantistoj, jam alkultimiĝis, ke post la Zamenhofa tago sekvas sekvanta jarŝanĝo (pardonu pro la taŭtologio – ταὐτός-λόγος – ripetado). Jes, ni sukcese festis naskiĝtagon de nia Majstro d-ro L. Zamenhof (apude – ŝikagaj E-istoj preĝas pro la estonteco de E-o, preĝon gvidas luterana pastro Hanso). Sube ni aperigas salutmesaĝon de la UEA prezidanto d-ro Marko Fettes, kiu substrekas, ke en nia “pace batalanta” mondo ne povas ekzisti neŭtrala movado, eĉ – lingva. Eble filozofoj klarigos al ni terminon de “paca batalo”!? Dume mi tion ne povas kompreni. Pardonu pro la mallarĝeco de mia cerbo.*



*Plie, nia prezidanto, d-ro Leszek, estis intevjuita de la la podkasto de niaj ĝemeloj el Varsovio, kie oni (atenton!) menciis ne nur nian E-kolektivom, sed ankaŭ nian karan (sendube – por mi) bultenon “Saluton!”. Dankon, gefratoj!*

*Alia informo venis el Svedio, de nia ĝemela urbo Gotenburgo. Fakte, por mi, ĝia fiero estas dubinda aŭ, almenaŭ, antaŭtempa, sed la tempo montros. Ne povas anoj de la islama kulturo kunvivi kun aliaj. Ni atendu, sed la lasttempaj evidentaĵoj pruvas miajn dubojn.*

*Pardonu pro la negativoj, la mondo ŝanĝiĝas!*

–La Redaktoro

## Labori por Paco en Malpaca Mondo

La Novjara Mesaĝo de UEA-prezidanto Mark Fettes



La pasintan jaron ombris militoj kaj atencoj. Ukrainio, Sirio [en ĉio kulpas Moskovio – **Red**]... en ĉiuj kontinentoj, miloj da homoj mortis perforte, per bomboj kaj pafiloj, en daŭrantaj konfliktoj diversspecaj. Teroratakoj amase mortigis civitanojn en Ankaro, Garisso, Bejruto, Parizo, Tunizo, San-Bernadino. Pri kelkaj el tiuj tragedioj oni vaste raportis; pri aliaj nur malmulte. Sed pri rapidaj kaj facilaj solvoj oni ne povas paroli, ĉar temas pri fruktoj de longa malpaca historio.

Tiu malpaca historio estas la fono, sur kiu aperis kaj disvolviĝis nia movado por lingvo neŭtrale homa. Ni ĉiuj konas la alvokojn de Zamenhof, ke ni, pacaj batalantoj, laboru por starigi unu grandan rondon familian en kiu ĉiuj homoj kaj popoloj povus senti sin sekuraj kaj juste traktataj. Sed ni ne forgesu, ke li faris tiujn alvokojn fronte al kruelaĵoj, kiuj hante similas tiujn de la nuna mondo. Jam en la dua Universala Kongreso en Ĝenevo, 1906, li elvokis la eventojn en sia ruslanda patrujo: “Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta moskovio (red. t. n. rusujo). Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo! Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bielostok, rigardadis kun doloro la reciprokan

fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj sonĝoj mi ekvidis teruran efektivaĵon: en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bielostoka buĉado; al vi kiel al Esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.”

Komprenoble Zamenhof ne povis antaŭvidi, kiom pli teruraj kaj amasaj estos la suferoj de viktimoj en la unua kaj dua mondmilitoj, kiam pereos i.a. liaj propraj familianoj. Sed li jam komprenis, kiel li diris la postan jaron en la londona Gildhalo, ke *longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, antaŭ ol la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj.*

Kiel ni, esperantistoj, konduku, fronte al tiuj realaĵoj? Evidente ni ne estas imunaj kontraŭ antaŭjuĝoj kaj misperceptoj pri niaj kunhomoj; ĉiu el ni dividas, certagrade, la valorojn kaj vidpunktojn de siaj etno, ☞

socia klaso, amaskomunikila medio kaj simile. Iĝante esperantisto, oni ne demetas siajn aliajn identecojn. Tiel eblas, ke esperantistoj tiriĝas al malsamaj flankoj en diversaj konfliktoj, aŭ pli spontane sentas solidarecon kun iuj viktimoj ol kun aliaj. Tiel eblas, ke ankaŭ en Esperanto foje aperas esprimoj de maltoleremo, malrespekto, eĉ malamo.

Lerni Esperanton estas efektive nur unu paŝo sur longa, preskaŭ senfina vojo al homaraneco. La lingvo donas al ni multon: esprimilon, komunikilon, kulturbazon, tradiciaron; unuvorte, komunumon. Sed, por citi Zamenhof denove: *Ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn*. Kiel fari tion pli efike, pli konsekvence, pli bone – jen grava demando por la 101-a Universala Kongreso en Nitro. Sub la temo Socia justeco – lingva justeco ni havos okazon reрпиensi la laboron de la esperantistoj por pli paca mondo. Ni ja ne estas solaj en tiu laboro; amaso da movadoj, multe pli ol en la tempo de Zamenhof, dividas niajn valorojn kaj niajn celojn, se ne ankoraŭ nian lingvon. Malfermante nian modestan memlernejon al iliaj ideoj kaj atingoj, enplektante ilin en niajn diskutojn kaj planojn, ni samtempe plifirmigos nian pozicion en la tuthomara strebado por paco kaj justeco.

Mi deziras al ĉiuj esperantistoj pacan kaj solidarecan jaron 2016!

## Intervjuo en Varsovio

Prezidanto de ESdŜ d-ro L. Kordylewski donis vastan intervjuon al la podkasto de la ĝemela E-kolektivo “Varsovia vento”: <http://www.podkasto.net/wp-content/uploads/2015/11/151028VVE109P3.mp3>

La intervjuon akompanis E-traduko de la fama pola kanto pri batalo inter poloj kaj ukrainoj, tekston de kiu vi piovas trovi sube (tradukis – renoma E-kantisto JoMo);

### ❖ Hej, la Falkoj ❖

*Trista, trista nun mi estas*

*Shi do restis izoleta*

*Pro knabino kiu restas*

*Hirundeto mia, mia eta*

*En la verda Ukrainjo*

*En la verda Ukrainjo*

*Kaj nun regajigos min nenio*

*Kie brulas mia korpasio*

*Rf.: Hej, hej Vi la falkoj*

*Vinon, vinon, vinon donu*

*Nun forflugu norden ghis bankizoj*

*Kaj min tiel ne plu konu*

*Sonu, sonu sonorilo*

*En la verda Ukrainio*

*En la stepo sonu, sonu nun*

*Kie brulas mia korpasio*

## La Rifuĝo Elektis Nin de Andreas, E-Societo de Gotenburgo

Sabate 7 novembro dukeko da interesitoj renkontiĝis por aŭskulti, kion du junaj E-parolantaj viroj, ĉi tie nomitaj L. kaj M., el Sirio rakontis pri sia fuĝo el la milito.

Ili komencis sian rakonton per kelkaj bazaj informoj: Sirio estas surface iom pli malgranda ol Svedio, enloĝantoj proks. 22 milionoj, de kiuj duono estas rifuĝantoj en aŭ ekster la lando pro la interna milito, kiu komenciĝis antaŭ kvin jaroj. 2–3 milionoj troviĝas en Turkio kie la plejmulto vivas sub malfacilaj kondiĉoj, uzataj kiel senkosta laborforto, ankaŭ infanoj.

Laŭ la rifuĝitinero L. kaj M. devis trapasi la Mediteraneon inter Turkio kaj Grekio. Ili tamen ne vojaĝis kune, sed renkontiĝis unue ĉi-tie en Svedio. En Turkio ili povis trovi homkontrabandistojn kaj aĉeti savoveŝtojn. Tiuj kontrabandistoj postulis 6000 € kion L. kaj M. devis prunti de parencoj, kiuj povis sendi ĝin per Western Union. Unu el la ŝipoj paneis kaj M. devis naĝi dum tri horoj por atingi la bordon de Grekio. Montriĝis krome ke la savoveŝto ne funkciis, la kontrabandistoj ne

zorgas pri la sekureco. La dua ŝipo dronis kaj D. devis naĝi ses horojn reen al Turkio por fari novan provon. Ok homoj dronis en tiu ŝipo, ankaŭ infanoj. En Ateno ili povis aĉeti falsan identigan dokumenton kaj pluiri per kontrabandistoj al Germanio kaŝitaj en ŝarĝaŭtoj. L. rakontis ke li devis sidi tute senmova dum 30 horoj en la posta parto de la kajuto de la ŝarĝaŭto. La lasta parto de la rifuĝo ili povis iri per trajno.

L. kaj M. rakontis kaj svede kaj Esperante. Ili mirige rapide lernis la svedan, M. nur estas ĉi-tie du monatojn, L. de la antaŭa jaro. En Sirio L. estis studanta komputikon, kiun li devis interrompi pro la rifuĝo. Ĉi-tie li povas daŭrigi siajn studadojn, li vere volas kontribui al la sveda socio. L. pasis la aĝon de dudek, sed M. estas nur 17 kaj tial loĝas ĉe sveda prizorga familio. Ili ambaŭ estas engaĝitaj en la repaĝaro Duolingo, kie oni povas lerni diversajn lingvojn, inkluzive Esperanton. Ili kunhelpas evoluigi ĝin al arablingvanoj kiuj volas lerni la svedan, kio povas helpi arablingvaj rifuĝintojn en Svedio. L. instruas ankaŭ Esperanton al niaj komencantoj, por kio ni estas dankemaj.

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Randy Ream  
1835 N. Natoma Ave.  
Chicago, IL 60707  
773-262-7738  
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Randy Ream  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Tina Seastrom  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon!  
Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276

**26an de Januaro** – Hiram parolos pri la Epikuranismo

**23an de Februaro** – Hanso enkondukos en la mondon de Luteranismo

**22an de Marto** – diskuto pri “Lingvoj de la mondo”, gvidas Araneo